# *Prezentos Kubo en UN rezolucion kontra? la usona blokado*




Havano, apr 23 (RHK) La ministro pri eksteraj rilatoj de Kubo, Bruno Rodríguez, deklaris ?i-?a?de ke la venontan 23-an de junio la ?enerala Asembleo de UN prikonsideros la rezolucion por ?esigi la usonan blokadon kontra? nia lando.

La kuba ministro emfazis ke la blokado estas genocida ago, kiu konsistigas amasan perforton de la homaj rajtoj.

En la socia reto Tvitero, li esprimis ke la 243 punregula?oj aplikitaj de la usona eksa prezidento Donald Trump,  restas validaj sub la administracio de Joe Biden.

“La blokado estas kruela politiko, kiu provokas suferojn, mankojn kaj limigojn al la kubaj familioj. ?i estis plifortigita tute intence dum la pandemio de Kovim-19; ?i malfaciligas la aliron al medikamentoj, varoj kaj iloj necesaj”, emfazis la ministro.

Rodríguez asertis ke la ekonomia, komerca kaj financa blokado kontra? la insulo, limigas la voja?liberecon de la usonanoj, kaj “?ia apliko eksterteritoria draste reduktas niajn enspezojn kaj obstaklas la evoluon”.

“Kiel la viruso provokanta tiun ?i pandemion, la usona blokado sufokigas kaj dama?as la kubajn familiojn”, li aldonis.

La kuba ministro sciigis, krome, ke Kubo fidas je la subteno de la internacia komunumo por ?esigi tiun ?i malhumanan politikon.

Fonto: Cubadebate

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/255048-prezentos-kubo-en-un-rezolucion-kontrau-la-usona-blokado

Radio Habana Cuba